

Laborplano de TEJO

2013/2014



Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando

Kompilis Łukasz Żebrowski, Prezidanto de TEJO
Varsovio, la 8-an de septembro 2013

Aprobata de la Komitato dum la 69-a IJK en Nazareto

I. ENKONDUKO

Kreado de la laborplano

Tiu ĉi laborplano estas la unua preparata laŭ tute alia maniero ol tio estis ĝis nun. Tradicie la novelektata Estraro ne tuj havis sian laborplanon, sed ĝi estis preparata je la komenco de oficperiodo. Tiu aliro tamen ne estas plej konvena, ĉar ja ne estas la Estraro, kiu difinu siajn taskojn, sed la Komitato, kiu decidas pri la ĉefa direkto de la organizo. Tial, je la fino de nia mandato, ni proponis multe pli fruan kaj samtempe multe pli vastan kreadon kaj konsultadon de la laborplano. La unuaj alvokoj kontribui estis dissenditaj meze de aprilo. La respondoj alvenadis en majo, junio kaj julio de la Landaj Sekcioj, de la komitatanoj, de la estraranoj, de la kandidatoj por la Estraro, de la oficisto kaj ankaŭ de la individuaj membroj de TEJO.

Konstruo de la laborplano

Ĉi tiu dokumento kreiĝis surbaze de ĉi tiuj kontribuoj, sed ankaŭ surbaze de la Strategia Laborplano de UEA por la jaroj 2013-2017 kaj de la dokumentoj de la UEA-komitatkunveno okazinta dum la UK 2013 en Rejkjaviko. Ĝia konstruo ankaŭ estas iom nova. En la dua parto de la laborplano ni difinas la ĉefajn celojn, kiuj staras antaŭ TEJO, kiel organizo tutmonda, esperantista kaj junulara. Tio estas iusenca provo eliri de la ĝisnuna pensmaniero, laŭ kiu ni havis sole liston de realigendaĵoj por ĉiu unuopa estrarano. Kompreneble, kiel ĉiu unua provo, ĝi ne povas esti perfekta, nek kompleta, tamen ni esperas tiel komenci verŝajne longan kaj malfacilan procezon alimaniere rigardi la sencon por kiu TEJO ekzistas kaj aktivas.

En la tria parto de la laborplano oni povas trovi la ĉefajn prioritatojn kaj la konkretajn agadojn realigendajn kadre de la estraraj fakoj. Ĝi do estas iom pli tradicia parto de la laborplano, tamen ankaŭ ĝin ni strebis plibonigi. Nome, la agadojn ni celis difini en la ideo de SMART (Specifaj-Mezureblaj-Ambiciaj-Realigeblaj-Templimigitaj). Tial en iliaj priskriboj plej ofte eblas trovi laŭeble precize difinitajn atendatajn rezultojn (por tia ĝenerala dokumento kompreneble) kaj substrekitajn limdatojn kaj aliajn tempo-difinojn. Ili helpas al ni kaj al ĉiuj interesiĝantoj pli facile superrigardi realigadon de la laborplano.

Kontrolo pri realigado de la laborplano

Tiu lasta, do publika superrigardo pri realigado de la laborplano estas plia novaĵo kiun ni proponas. La celo estas havi "vivantan" laborplanon, kiu estos publika, rete konsultebla dokumento, kiun regule aktualigu kaj komentu la koncernaj respondeculoj, por ke ĉiuj povu facile ekscii kio kaj kiam okazas en TEJO por tuje aliĝi al la agadoj.

Konsisto de la Estraro

Realigon de la laborplano gvidos la Estraro de TEJO elektita en la 69-a Internacia Junulara Kongreso okazinta en Nazareto, en la jena konsisto:

- Łukasz Żebrowski - Prezidanto; kunordigo
- Paweł Fischer-Kotowski - Ĝenerala Sekretario; Pasporta Servo
- Nico Huurman - Kasisto; financoj, subvencipetado, eksteraj rilatoj
- Michael Boris Mandirola - Unua Vicprezidanto; landa agado, edukado
- Tina Tišljár - Dua Vicprezidanto; kongresoj
- Veronika Poór - Estrarano pri homaj rimedoj, aktivula trejnado, scienca kaj faka agado
- Alexandre Raymond - Estrarano pri informado, kulturo

Mallongigoj

Jen la listo de la mallongigoj kaj akronimoj uzataj en la laborplano kun iliaj respektivaj signifoj.

AESEE	Eŭropa Studenta Forumo
AT	Aktivula Trejnado
CED	Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj
CO	Centra Oficejo de UEA/TEJO
EBM	Eŭropa Renkontiĝo de Estraroj de AEGEE

ER	Eksteraj Rilatoj
EU	Eŭropa Unio
FoJE	Forumo Junulara Eŭropa
HR	Homaj Rimedoj
ICMYO	Internacia Kunordig-Renkontiĝo de Junularaj Organizoj
IJK	Internacia Junulara Kongreso
ILEI	Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
IM	Individua Membro de UEA/TEJO
JES	Junulara E-Semajno
KER	Komisiono pri Eksteraj Rilatoj / Komuna Eŭropa Referenckadro
KODEJO	Kompleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj
KRIO	Komisiono por Rilatoj kun Internaciaj Organizaĵoj
LA	Landa Agado
LS	Landa Sekcio
RITE	Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net
TEJO	Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
TT	TEJO tutmonde
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UK	Universala Kongreso de Esperanto

II. LA CELOJ

1. Tutmondaj

TEJO estas tutmonda organizo kaj pro tio devas agi je la internacia nivelo. Eventuala kroma rolo de TEJO estu kapabligi kaj subteni la aktivularon je la landa aŭ loka nivelo, sen anstataŭi ĝin. TEJO reprezentas la junularan E-movadon en la internacia medio kaj ankaŭ pro tio gravas zorgi pri ĝia bildo, sen engaĝiĝi en aktivaĵojn, kiuj povus doni la impreson de malgranda kaj amatora organizo.

Por garantii tutmondecon grava estas la rilato kun aktivuloj kiuj venas el regionoj en kiuj TEJO ne estas tre aktiva. Simple ne eblas distance (ekzemple el Eŭropo) sekvi kaj kompreni la situaciojn en aliaj kontinentoj, nia nura rimedo estas kapabligi kaj motivigi lokajn homojn.

Inter la plej bazaj rimedoj por atingi tion estas okazigi regulajn skajpkunsidojn de reprezentantoj (komisiitoj) de iu mondregiono kun estrarano pri LA, kaj eventuale oficisto, estrarano pri ER aŭ aliaj interesitoj, por konsultiĝi pri projektoj, informi pri la regiona agado k.s.

Por certigi realigadon de la tutmondaj celoj necesas ankaŭ rezervi parton de la buĝeto por la ekster-Eŭropa agado.

2. Esperantistaj

TEJO estas Esperanta organizo kaj ĝi unuavice okupiĝu pri Esperanto. Estas vero, ke multaj (junaj) esperantistoj ŝatas utiligi la lingvon por diversspecaj agadoj, tamen tio ne povas esti preteksto por ke la organizo ne zorgu pri siaj ĉefaj celoj kaj prioritatoj. Niaj fortoj kaj rimedoj estas ja relative malmultaj, kaj ni ne povas permesi dispecigi ilin. Ni devas pravigi nian ekziston al ni mem kaj al la ekstera mondo, farante tion pro kio ni ekzistas.

Ekstere

Necesas informi pri Esperanto, kaj konsciigi junulojn ekster-Esperantujo pri la temoj rilataj al lingva justeco, multlingveco, defendo de minoritataj lingvoj, komunika efikeco kaj praktikaj aplikebloj de Esperanto ktp. Por tion atingi oni povas ekzemple:

- subteni kaj kunlabori en kampanjoj de aliaj organizoj aŭ grupoj pri la menciitaj temoj, aŭ krei proprajn;
- provizi riĉan multlingvan enhavon en la retejo;
- kreadi aleksteran bultenon, kiu informu pri nia agado;
- subteni la partoprenon en internaciaj junularaj eventoj, celitaj al taŭgaj celgrupoj, kie eblas disvastigi la ideon de Esperanto kaj lingvaj rajtoj per prelegoj, prezentoj, diskutgrupoj k.s. (kelkaj ekzemploj: la poliglota renkontiĝo 2014 en Berlino, la foiro pri Edukaj Iloj en Grekujo, UNITED-konferenco en Prago, la eventoj de ICMYO kaj FoJE).

Interne

Necesas konsciigi kaj trejni la TEJO-aktivulojn kaj ĝenerale junajn esperantistojn, pri la temoj supre menciitaj, por ke plej eble multaj konsciui pri ili kaj kapablu agadi por ili. Tio fareblas ekzemple per:

- artikoloj en *Kontakto* aŭ en la retejo;
- kunlaboro kun ekz. Nitobe, aŭ ekstermovadaj organizoj kiuj okupiĝas pri lingvaj rajtoj;
- programeroj kaj trejnadoj dum E-eventoj.

3. Junularaj

TEJO estas junulara organizo kaj en tia medio aparte gravas kapabligo kaj motivigo de la aktivuloj. Estante junulara organizo (de kaj por junuloj) TEJO devas prizorgi ke ĝiaj agadoj estu okazo por evoluo kaj kresko por la membroj kaj aktivuloj. Aktivi por TEJO kaj ĝenerale por Esperanto, povas signifi progreson laŭ pluraj vidpunktoj: persona, profesia,

rilata ktp. TEJO devus ne nur strebi komprenigi tion al la junuloj, por motivigi ilin al aktivado, sed ĉefe trovi ĉiam novajn, konkretajn kaj inkluzivajn manierojn por doni tiun eblecon. Tial necesas:

- kompletigi, konkretigi kaj realigi la strategion pri AT verkitan en 2012;
- okazigi trejnad-programerojn kadre de E-aranĝoj;
- igi pli regula kaj normigita la informadon pri ekster-Esperantaj trejnadoj;
- elpensi manierojn por pluumi la rezultojn de la trejnadoj, ekz. aktivigante la homojn, kiuj partoprenas ilin, ekzemple kadre de projektoj aŭ komisionoj, kaj teni la kontakton kun ili.

Alilfanke gravas provizi eblecojn por utiligi Esperanton en interkultura kaj internacia medio, disvastigante kaj pritraktante temojn ligitajn al la junularo aŭ interesajn por junuloj. Eblas do subteni, unuavice per aŭspicioj kaj varbado, projektojn, asociojn aŭ grupojn kun tiuj celoj, kaj sekve difini kriteriojn kaj normajn manierojn, laŭ kiuj la subteno povus eventuale esti ankaŭ kunlabora kaj financa.

4. Organizaj

TEJO estas organizo kaj do por iĝi pli forta ĝi devas pliefikigi siajn strukturon kaj internan funkciadon. Eblas tion pli konkrete bildigi en tri dimensioj.

Financoj

Por plifortiĝi finance TEJO devas:

- diversigi la fontojn de enspezoj;
- daŭrigi kun la konataj Eŭropaj subvenci-programoj, celante akiri la administran subvencion kaj almenaŭ unu projektan;
- realigi almenaŭ unu donac-kampanjon por konkreta projekto/fonduso;
- varti la rilatojn kun iamaj, nunaj kaj potencialaj ontaj privataj donacantoj.

Membraro

Por pligrandiĝi membrare necesas:

- realigi komence de la jaro membriĝkampanjon, kiu provu ne nur allogi per rabatoj aŭ ĉarmaj donacoj, sed ankaŭ konsciigi pri la graveco kaj la indeco de la membriĝo;
- engaĝi LS-ojn kaj aliajn partnerajn organizojn en la strebojn pligrandigi la membraron, ekz. pripensi komunajn kampanjojn, doni servojn je avantaĝaj kondiĉoj al TEJO-membroj k.s.;
- pludiskuti kun UEA ontajn statutajn ŝanĝojn, kiuj konduku al pli vasta difino de membreco.

Organizo

Por pliefikiĝi organize gravas:

- reorganizi la ekzistantajn rimedojn por organiza mastrumado (ekz. vikioj, kalendaroj);
- enkonduki novajn rimedojn por organiza mastrumado surbaze de la bezonoj komune identigitaj ene de unuopaj "teamoj" (estraro, komisionoj, laborgrupoj, oficejo k.s.);
- enkonduki sistemojn, laŭokaze pli aŭ malpli normigitajn, por la evaluado de la projektoj, kaj de la individua laboro de la TEJO-aktivuloj;
- ekigi la procezon de la strategia planado, engaĝante ĉiujn interesitajn agantojn de la organizo (aŭ reprezentantojn de ili).

III. LA AGADOJ

1. Kunordigo

Rilate al la interna kunordigo de TEJO plej gravas daŭrigo de la jam okazanta vastigo de la partopreno – en agado, en decidoj, en kontribuo ĝenerale. Tion celas vasta konsultado de la laborplano kaj celos same vasta observado de ĝia realigado. Danke al tio ĉiu povu facile ekscii tion, kio kaj kiam estas realigata en TEJO por povi aliĝi al la agadoj.

Elirante iom de TEJO mem, apartan atenton en ĉi tiu oficperiodo devas ricevi kreado de komunaj strukturoj de UEA kaj TEJO por kunlaboro kadre de difinitaj kampoj pri komunaj kaj paralelaj projektoj. Konante la Strategian Laborplanon de UEA por la jaroj 2013-2017, sekvante la decidojn kaj intencojn de la ĵus elektita Estraro de UEA ne eblas ne rimarki tion, ke tre grandas la ŝancoj, sed ankaŭ sekvantaj ilin esperoj, por la signifa intensigo de komunaj agadoj.

Kunordigo de la laboro kun UEA

Okazigi regulan, almenaŭ ĉiumonatan, interŝanĝon de spertoj, planoj kaj ideoj por agadkunordigo kaj kunlaboro pere de reta kunsido inter la Estraroj de TEJO kaj UEA aŭ la respektivaj respondeculoj.

Rete konsultebla “vivanta” laborplano

Funkciigi la Laborplanon, kiel publikan, rete konsulteblan dokumenton, kiun aktualigu kaj komentu koncernaj respondeculoj. Tiuforma “vivanta” laborplano estu preta ĝis oktobro 2013 kaj ĝi estu konstante aktualigata.

Sistemo por superrigardi plenumadon de taskoj

Surbaze de ĝisnunaj esploroj enestrare funkciigi la sistemon por superrigardi plenumadon de taskoj (ĝis septembro 2013). Sekve analizi ties eblan funkciigon en la komisionoj.

2. Administrado kaj membroj

Jam de kelka tempo klaras, ke la nuna membreco-sistemo ne plu taŭgas al la ŝanĝiĝinta realeco kaj ne plu konformas al la bezonoj de TEJO, nek de la Esperanto-junularo aŭ eble eĉ Esperantistaro ĝenerale. Ĝia reformo certe ne estos procezo rapida, nek facila, ĉar plej verŝajne necesigus interalie ne facile fareblajn ŝanĝojn en la Statuto de UEA. Konsciante tamen, ke la ŝanĝoj en la Statuto estos bezonataj ĉiuokaze, nun estas la tempo prioritare pritrakti ankaŭ ĉi tiun temon.

Membrosistemo de TEJO

Kunlabore kun UEA pristudi reformon de la membreco-sistemo, aparte konsiderante la situacion en la kampo de eksteraj rilatoj. Ellabori la proponojn en ĉi tiu sfero kaj en sfero de la jura statuso de TEJO (vidu ĉe 3. Financoj kaj subvencipetado) plej malfrue ĝis la venonta UK.

Varbkampanjo

Ĝis oktobro 2013 pretigi planon de kampanjo por varbi (re)membriĝojn en TEJO en 2014. Komenci la kampanjon plej malfrue en la jarŝanĝaj aranĝoj.

3. Financoj kaj subvencipetado

Lastaj okazintaĵoj kun unu el la Eŭropuniaj fondusoj klare montris, ke ni neniam povas esti certaj eĉ pri tre regule ricevataj monrimedoj. Eĉ se laste ni feliĉe sukcesis solvi la problemojn, estontece ni devas esti sekurigataj ne nur per sufiĉe granda kapitalo, sed ankaŭ per diverseco de la monfontoj. Tial diversigo de niaj monfontoj estas grava prioritato de ĉi tiu laborplano.

Subvenciaj programoj en la nova eŭropunia sepjara kadro 2014-2020

Informoj pri la kadro estos publikigitaj en 2013, do ĝis marto 2014 prepari trarigardon de la novaj programoj kaj sekve pripensi kiujn ekzistantajn kaj novajn projektojn eblus financi per ĝi kaj kiel. Rezultoj estu prezentitaj forme de raporto ĝis marto 2014.

Administra subvencio

Ekhavi administran aŭ alian kompareblan subvencion por balanci la buĝeton de 2014 kaj espereble ankaŭ en la postaj jaroj (ĝis komenco de 2014).

Diversigo de monfontoj

Konatiĝinte kun la novaj subvenciprogramoj strategie pripensi kiel sendependigi nin de la administra subvencio, por ke ĝia eventuala malapero, ne starigu nin en malfacila situacio. Ĝis aŭgusto 2014 estu prezentita plano kiel fari, ke en 2015 administra subvencio estu malpli ol 50% de la TEJO-enspezoj (kompreneble sen perdi la administran subvencion).

Jura statuso de TEJO kaj ties rilato kun UEA

Kune kun UEA analizi juran statuson de TEJO fone de EU-subvencikadro 2014-2020 kaj laŭnecese trakti kun UEA tian strukturon en kiu TEJO, sen perdi la subtenon de UEA, en la okuloj de EU-burokratio estu stabile kaj nedubinde sufiĉe memstara por certi pri neperdebla subvencipetraĵo. Ellabori la proponojn en ĉi tiu sfero kaj en sfero de membro-sistemo de TEJO (vidu ĉe 2. Administrado kaj membroj) plej malfrue ĝis la venonta UK.

Kontoj kaj librotenado ĉe UEA

Ĝis la fino de 2013: repensi la funkciadon de la librotenado de TEJO, la taskodividon kaj kulaboradon inter la kasisto de TEJO kaj la kontistoj de UEA en la CO; reordigi la diversajn kontojn pri TEJO en la librotena sistemo de UEA kaj fermi kontojn de diversaj antaŭaj IJK-oj ankoraŭ ne fintraktitaj.

Manlibro pri financoj

Finverki la manlibron pri financoj ĝis julio 2014.

4. Kongresoj

Tri ĉefaj prioritataj celoj staras nun antaŭ ni en la kongresa kampo. La unua estas strategie la plej grava kaj tempe plej vasthorizonta. Temas pri reveno al aktiva esplorado de eblecoj organizi IJK-n en Afriko. Ĝia okazigo estus sendube novskala paŝo en konsekvenca tutmondiĝo de nia ĉefa kongreso kaj de niaj agadoj ĝenerale. Tiu vojo alportis novajn defiojn kaj problemojn, el kiuj fontas la dua prioritato: redifino de roloj, kiujn havu TEJO kaj lokaj organizaj teamoj en la organizado de IJK en malsimilaj kulturoj kaj malsimilaj medioj. Fine, ekhavinte la bezonon longdistance transdoni spertojn kaj sciojn, kiel la trian prioritaton ni havas kreadon de la sekvaj helpiloj por la organizantoj de IJK kaj eventoj, kiuj ampleksigos la jam ekzistantan kolekton.

IJK en Afriko

Rekomenci laboron de la Komisiono pri la Afrika IJK. Esplori eblojn pri okazigo de la kongreso tie, laŭeble kunlabore kun la ILEI-Konferenco. Prezenti kompletan raporton pri tio kaj rekomendon al la Komitato ĝis junio 2014.

IJK 2013

En septembro 2013 prepari kaj sendi al la partoprenintoj enketon por pritaksi la kongreson.

IJK 2014

Daŭrigi la konstantan kontakton kun la organiza teamo. La estrarano pri kongresoj partoprenu en la IJK, se finance eblas.

IJK 2015

Ĝis la fino de oktobro 2013 varbi eblajn organizantojn, ankaŭ konsilante al ili. Elekti kongreslandon ĝis la fino de novembro 2013.

Aranĝi intergeneracian programon dum IJK 2015 kun spert-transdonaj sesioj pri specifa laborkampoj, aktivula trejnado kaj strategia forumo, kiu traktu la postan strategian laborplanon.

IJK 2016

En julio aŭ aŭgusto 2014 fari la decidon pri tio ĉu IJK 2016 okazu en Afriko kaj se ne – lanĉi la konkurson.

Partoprenu IJK-n 2014

Ĝis la fino de la jaro publikigi anoncon pri la konkurso.

Komunikado kun la kandidatoj por organizi IJK-n

Strebi konsciigi la kandidatojn por organizi IJK-n pri la ebleco konsultiĝi kun la estrarano pri kongresoj jam en la fazo de kandidatigo. Necesas ŝanĝi la percepton, ke estrarano pri kongresoj ekzistas por superrigardi la organizan teamon, ĉar la estrarano estas por helpi – en la kandidatigo kaj en la organizado.

Transdonebla IJK-aliĝilo

Surbaze de la aliĝilo al la israela IJK, ĝis la fino de la jaro finaranĝi la transdoneblan IJK-aliĝilon kaj bazon de aliĝintoj. Preparante tion, oni celu ankaŭ estontan disponigon al aliaj aranĝoj de LS-oj (depende de interesiĝo eble jam por la kongresa sezono en 2014) kaj laŭeble ontan vastigon je administra sistemo pri eventpartoprenantoj.

Buĝetaj skemoj por IJK

Trarigardi kaj renovigi la ekzistantajn buĝetajn skemojn de IJK kaj prepari ekzemplajn dokumentojn en variantoj por granda kaj malpli granda IJK (ĝis julio 2014).

Gvidlinioj pri la rilatoj inter la TEJO-Estraro kaj la organizaj teamoj de IJK

Surbaze de la ĝisnunaj spertoj kaj en kunlaboro kun la organiza teamo de IJK 2014 prepari praktikan gvidlibron pri la disdivido de la taskoj inter la TEJO-Estraro kaj organiza teamo de kongreso. La gvidlibro enhavu ankaŭ bazajn informojn, kiel la IJK-licenco, la rabatoj, la plej gravaj limdatoj, aliaj IJK-rilataj aferoj en la regularo kaj reglamentoj de TEJO. Ĝi ankaŭ estontece rolu kiel gvidlinioj por estrarano pri kongresoj. La gvidlibro estu preta ĝis oktobro 2014.

Trejnaj kaj ekzemplaj materialoj pri organizado de eventoj

Regule aktualigi kaj riĉigi la kolekton de trejnaj kaj instruaj materialoj pri organizado de eventoj en tejo.org.

Universalaj Kongresoj

Aranĝi lingvopolitikan simpozion kune kun UEA kadre de la UK en 2014. Aranĝi movadenhavan junularan programon kadre de la Universalaj Kongresoj.

Kunlaboro kun aliaj eventoj

En JES 2013 okazigi kunordigan renkontiĝon pri eventoj okazontaj en julio kaj aŭgusto 2015 por interkonsenti datojn, karavanojn, komunan varbadon ktp.

5. Eksteraj rilatoj

TEJO estas en kelkaj gravaj kadroj kaj dum la lastaj jaroj iĝis pli konata. Tio estis komenca paŝo, kiun devas sekvi pli aktiva strebo al kunlaborado kun aliaj organizoj, ĉefe tiuj kiuj povas iel kunlabori kun ni kaj akcepti niajn idealojn. Ankaŭ tiucele alstrebindas kroma partopreno de junaj esperantistoj al neesperantaj eventoj portante tien nian idearon. Aparte prilaborenda estas la kontinenta agado ekster Eŭropo.

FoJE – Forumo Junulara Eŭropa

Daŭrigi nian ĉeeston en FoJE (Forumo Junulara Eŭropa) per partopreno en almenaŭ 7 renkontiĝoj krom la statutaj dum la jaro 2013/2014.

Aliaj kontinentaj platformoj

Kandidatigi TEJO-n en almenaŭ unu ekstereŭropa kontinenta platformo ĝis julio 2014.

Temaj subgrupetoj en KER

Krei kelkajn temajn subgrupetojn (daŭripova evoluo, laboro, rasismo ktp.) ene de KER, kiuj sekvu la koncernajn retdiskutojn kaj eventojn portante argumentojn pri la lingva flanko. Krei la unuajn 3 subgrupetojn ĝis la fino de 2013.

Kunlaboro kun Kontakto

Krei liston de la plej prioritataj kaj aktualaj temoj por KER kaj ĝin aktualigi ĉiun trian monaton. Kunlabore kun la redaktoro de *Kontakto* instigi al verkado de tiutemaj artikoloj.

Unua listo, kiu valoru por la unua trimonato de 2014 estu preta je la fino de 2013 (preciza limdato dependas de la redaktoraj limdatoj).

Komisiono por Rilatoj kun Internaciaj Organizaĵoj de UEA

Kunlabori kun UEA en la kreado de la nova komisiono KRIO (Komisiono por Rilatoj kun Internaciaj Organizaĵoj). Havi funkciantan komisionon ĝis februaro 2014.

Banko de modelaj dokumentoj

Kunlabore kun UEA pretigi bankon de modelaj tekstoj, argumentoj, faktoj kaj ideoj uzablaj en la eksteraj rilatoj, aparte uzante la jam kolektitajn dokumentojn en la TEJO-vikio. Havi funkciantan paĝon ĝis oktobro 2013 kun almenaŭ deko da dokumentoj.

Unuiĝintaj Nacioj

Partopreni en la debatoj de UN pri la jarmilaj mondevoluigaj celoj kaj enigi tie en la oficialajn dokumentojn menciojn pri lingvopolitiko aŭ eĉ pri Esperanto. Trovi TEJO-reprezentanton por la Novjorkaj UN-renkontiĝoj (ĝis junio 2014).

Unesko

Partopreni la Junularan Forumon kun TEJO-budo kaj almenaŭ unu alian iniciaton dum la jaro 2013/2014.

ICMYO – Internacia Kunordiga Kunsido de Junularaj Organizoj

Partopreni la ICMYO-kunsidon (en septembro 2013) kaj laŭeble eltiri utilajn agadojn.

Lingvopolitika seminario

Realigi kun neesperanta organizo seminarion pri lingvopolitiko kun komuna rezolucio (projekto preta ĝis majo 2014).

Kunlaboro kun AEGEE

Kunlabori kun AEGEE partoprenante programon prilingvopolitikan dum EBM kaj Agorao, cele al komuna poresperanta lobiado ĉe la Eŭropa Parlamento. La partopreno estu planita ĝis oktobro 2013.

Kunlaboro kun asocioj pri edukado

Eltrovi kaj katalogi junularajn asociojn okupiĝantajn pri internacia edukado kaj ekrilati kun ili konsulte kun UEA. Havi liston ĝis marto 2014.

6. Homaj rimedoj

La prioritato tiukampe estas tiel strukturigi la homrimedan politikon de TEJO, ke ĉiuj, kiuj ŝatus agi por Esperanto trovu por si la taŭgan eblecon tion fari ene de TEJO. Unuavice necesas atenti pri la travidebleco de TEJO, por ke homoj, kiuj nur konas la interretan movadon, ankaŭ trovu eblecon kontribui al la organizo. Necesas atenti ankaŭ pri novaj homoj aperantaj en renkontiĝoj kaj en LS-oj. Fine al ĉiuj necesas certigi laboron en bonaj kondiĉoj, laŭeble plej efike kaj bonetose.

Aktivula datumbazo

Ĝis septembro 2013 kolekti ĉion ĝis nun kreitan pri la Aktivula datumbazo (inkluzive de la kodo de la prototipo). Ĝis la fino de 2013 trovi novan programiston, samtempe traktante kun UEA eventualan integrigon kun ilia(j) datumbazo(j). Havi novan prototipon ĝis aprilo 2014 kaj plene funkciantan datumbazon ĝis julio 2014. Kunlabore kun LS-oj ekvarbi pri ĝi dum la kongresa sezono 2014.

Homaj rimedoj ĉe tejo.org

Kadre de la renovigo de tejo.org aranĝi parton en tejo.org dediĉitan al homaj rimedoj, kiu konsistu el formularo por enskribiĝi al la Aktivula datumbazo kaj anoncoj pri vakaj postenoj.

Prezentadoj pri TEJO en eventoj

En ĉiuj ĉefaj aranĝoj partoprenataj de la junularo okazigi prezentadojn kaj/aŭ kvizojn pri TEJO, kun aparta emfazo pri la aktiviĝebleco en la organizo.

Informado pri la komisionoj

Ĉiumonate dissendi informojn kaj varbi pri unu el la komisionoj. Tiupunkte aparte kunlaborigi LS-ojn.

Kunlaboro kun lernu.net

Ekigi kunlaboron kun lernu.net por proponi al la ties kursanoj aktiviĝon en TEJO. Tio funkcii laŭeble ĝis la fino de 2013.

Gvidlinioj pri la komisiongvidado

Elabori gvidliniojn pri la komisiongvidado kaj krei konsilon pri vartado de la homaj rimedoj (t.e. kiel taŭge taski, motivigi kaj gratuli homojn, kiel enkonduki novulon ktp.). Pretu ĝis majo 2014.

Financado de etaj junularaj projektoj

Krei planon (ĝis oktobro 2013) pri fonduso por etaj projektoj, kiuj celas antaŭenigi la junularan movadon. Laŭeble rezervi por ĝi rimedojn en la buĝeto por 2014.

Manlibro por TEJO-volontulo

Surbaze de la spertoj de la nuna volontulo kaj kunlabore kun la sekva, ĝis septembro 2014 finpretigi la manlibron por TEJO-volontulo.

7. Aktivula trejnado kaj seminarioj

Prioritata nuntempe estas interretigo de nia aktivado en la kampo de aktivula trejnado, kiu permesos al ni vastigi atingeblecon de niaj materialoj kaj tiel proksimiĝi al la aktivuloj, kiuj ne havis okazon tiom ofte partopreni la E-eventojn. Necesas fokusigi niajn trejnadojn je la kampoj kiuj nuntempe estas malpli sukcesaj. Indus ankaŭ organizi movadklerigajn kaj lingvopolitikajn seminariojn, por agado pli konscia kaj do pli motivita.

Ĉi-kampe aparte prioritata estas forta kunlaboro kun UEA, por ke la plejmulto de la Esperanto-aktivularo povu profiti kaj kleriĝi el la novaj ideoj alvenantaj tra la junularo kaj aliflanke la TEJO-anoj povu lerni de pliaĝaj spertuloj.

Retaj aktivulaj trejnadaj

Ĉiun trian monaton lanĉi novan retan trejnadmaterialon, ĉiam kun informo pri kontaktebla pritema spertulo. Esplori ĉu estus interesiĝo pri retaj renkontiĝoj kun tiuj spertuloj, iom da tempo post lanĉo de tia materialo. Regule korektadi kaj plibonigadi la publikigitajn materialojn, surbaze de la komentoj de uzantoj.

Ĉeestaj aktivulaj trejnadaj

Okazigi ĉeestajn aktivulajn trejnadojn en ĉiuj plej gravaj aranĝoj partoprenataj de la junuloj.

Trejnmaterialoj por aranĝoj

Krei sufiĉe detalajn priskribon por la jamaj ĉeestaj trejnadaj de TEJO kaj ankaŭ por la estontaj retaj aŭ ĉeestaj, por ke ili estu uzeblaj sen la originalaj trejnistoj.

Trejnseminario pri la lingvopolitiko en la Eŭropa integriĝo

Resubvencipeti kaj organizi seminarion kun alia(j) junulara(j) organizo(j) kiu(j) favoras al la Eŭropa integriĝo por preparoli kun ili la lingvopolitikan flankon de tiu procedo. Dum tiu seminario krei komune interkonsentitan skizon de efika kaj justa eŭropa lingvopolitiko kaj laŭeble ĝin disvastigi al pli larĝa publiko; limdato: unu monaton post la seminario.

Spertinterŝanĝo de kasistoj

Krei retliston por interŝanĝi spertojn kaj konsilojn de la aktivuloj okupiĝantaj pri la financoj de niaj LS-oj (ĝis oktobro 2013). Tie pretigi kun ili projekton de eventualaj kunsidoj en iu(j) aranĝo(j) kaj de trejnado por kasistoj.

Trejnadoj de UEA

Varbi junulojn al la trejnadaj aranĝataj de UEA kun la celo, ke junuloj estu almenaŭ triono en tiuj trejnadaj.

Informado pri la trejnadaj de ne-E-organizoj

Informadi pri utilaj trejnadaj organizataj de neesperantistaj organizoj – ne nur pere de la kutimaj komunikkanaloj, sed ankaŭ individue proponante al taŭgaj aktivuloj.

Interlingvistika seminario kun CED

Engaĝiĝi al organizado de seminario pri lingvistiko kunlabore kun CED.

Trejnseminario kun AEGEE

Rekonsideri kion fari kun la malsukcesinta subvencipeto. Ĝis novembro 2013 decidi pri la estonteco de la projekto.

8. Landa agado

Kampe de landa agado, la ĉefa direkto estu helpi la kreigon de junulara movado kie ĝi apenaŭ estas, sekvi la landajn sekciojn en malfacilaĵoj kaj fine proponi kaj kunordigi kunlaborojn inter la LS-oj. Unuacele certe necesas la helpo pri burokratiaĵoj kaj la morala subteno, kiu povas doni kuraĝigon al la aktivuloj, sed eble eĉ pli strebo renkontigi ilin kun la internacia E-movado. Dua- kaj triacele ni bezonas pli rektan kaj oftan kontakton inter la kernaj aktivuloj de TEJO kaj de la Landaj Sekcioj por aŭskulti pri iliaj problemoj, doni konsilojn, diskonigi kiel TEJO povas konkrete helpi ilin, instigi partoprenon al la komunaj iniciatoj kaj kunordigi la ekzistantajn.

Strebo al novaj LS-oj

Ĝis januaro 2014 pretigi planon por renkontiĝo(j) de junaj E-aktivuloj en lokoj kie mankas LS por trejni ilin, proksimigi ilin al la internacia E-movado kaj instigi al organiziĝo. Potencialajn LS-ojn subteni konforme al iliaj helpbezonoj kaj teni en konstanta kontakto. Ĉio ĉi celante ekhavi almenaŭ unu novan landan sekcion en 2014 kaj same en la sekvaj jaroj.

Vekiĝantaj kaj problemhavantaj LS-oj

Krei mentoran sistemon (fare de pli sperta aktivulo eksterlanda) por vekigantaj aŭ problemhavaj LS-oj, kiu ekfunkciu plej malfrue aprile 2014. Teni kontakton kun la plenkreska organizo okaze de malbonstato de la junulara.

Interŝanĝoj kaj partneradoj

Kontaktigi kaj instigi lokajn grupojn al ĝemeliĝo kaj partnerado. Difini, proponi kaj lanĉi novan eventformaton: la kulturinterŝanĝojn, kiuj komencu funkcii ĝis oktobro 2013.

Kunordigo de la agado

Kunordigi la TEJO-agadon kun la landsekcia agado, ĉefe pri la kampoj ER, AT, HR, informado kaj kongresoj.

Mondregionaj komisionoj

Ĝis fino de 2013 funkciigi mondregionajn komisionojn por mastrumi la tuton kaj okazigi iliajn regulajn skajpkunsidojn, laŭbezone kun aliaj koncernaj TEJO-aktivuloj.

Landaj laborgrupoj

Kunkrei laborgrupojn celante kunordigi laboron de la landaj sekcioj de TEJO, UEA, ILEI kaj aliaj landaj aktivuloj. Farenda ĝis junio 2014.

Eventoj de LS-oj

Kadre de la modernigo de tejo.org, krei kalendaron de la junularaj eventoj. Regule reklami eventojn kiujn la LS-oj organizas.

Materialoj por LS-oj

Kolekti de LS-oj iliajn statutojn kaj regularojn por laŭbezone havigi ilin, kiel ekzemplaj dokumentoj por aliaj. La kolekto pretu ĝis januaro 2014 kaj sekve estu regule riĉigata.

KODEJO

Publikigi la demandaron por 2013 ĝis la mezo de januaro 2014. Kolekti respondojn de LS-oj ĝis la fino de februaro 2014. Publikigi raporton pri KODEJO ĝis majo 2014.

9. Informado

Sendube la plej grava prioritato de nia informado estas renovigo de nia retejo, kiu pro problemoj en aktualigado de la sistemo nun estas en sufiĉe malbona stato. Do pretigo de la plano kiel realigi tion, estos inter la unuaj taskoj. Krome dum ĉi tiu jaro necesas aparte fokusiĝi pri la alekstera, precipe alilingva informado. Interna informado estis grave plibonigita dum la antaŭa oficperiodo. Nun necesas analizi la rezultojn kaj sekve plani la ontajn paŝojn.

Komisiono pri informado

Laŭeble tuj funkciigi komisionon pri informado, kiu konsistu el ĉiuj personoj jam engaĝitaj ene de tiu kampo, ĉiuj interesiĝantoj pri la temo kaj eblaj helpantoj. Ene de la komisiono estu trovitaj kunordigantoj de la unuopaj projektoj.

Renovigo de tejo.org

Ĝis novembro 2013 pretigi strukturan skemon kaj realigan tempoplanon de la renovigita retejo. Samtempe konsultiĝi kun UEA pri la planoj por ilia nova retejo kaj eventuale kunligi ambaŭ projektojn. Surbaze de tiuj informoj difini ĉu pli taŭgas krei novan retejon aŭ profunde modernigi la ekzistantan kaj rezervi en la buĝeto rimedojn por ĉi tiu celo. En decembro 2013 kaj dum la jarŝanĝaj aranĝoj konsulti la planojn kun la Komitato kaj aliaj aktivuloj engaĝiĝintaj en la projekton. Ĝis aprilo 2014 trovi realiganton de la retejo, kiu kreas ĝin laŭ la struktura skemo kaj kadre de la tempoplano.

Tradukantoj kaj alilingvaj respondantoj

En septembro 2013 esplori ekzistantajn datumbazojn de tradukantoj kaj eblecojn por kunlaboro aŭ kreo de komuna datumbazo. Kompleta reto de tradukantoj estu preta ĝis la fino de la jaro. Samtempe en tejo.org krei paĝon kun retadreso de homoj, kiuj povus en variaj lingvoj respondi al petoj, demandoj pri Esperanto (laŭeble kun fotoj).

Unustila informilo tradukebla al naciaj lingvoj

Ĝis septembro 2013 finpretigi grafikan aspekton de la informilo. Tiam rete publikigi ĝin alvokante al tradukoj ĝis la fino de novembro 2013. Okaze de interesiĝo okazigi komunan eldonon de diverslingvaj versioj antaŭ la jarŝanĝaj aranĝoj.

Kunlaboro kun UEA

Partopreni en la difino de la UEA-informstilo kaj eventuala difino de la TEJO-substilo. Partopreni informkampanjojn de UEA.

Sociaj retoj

Ĝis oktobro 2013 krei alilingvajn tviterkontojn de TEJO. Tie kaj pere de Facebook regule elsendi novaĵojn pri lingvopolitiko kaj pri Esperanto.

Dialog'

Surbaze de la ĝisnunaj diskutoj, kadre de la informada komisiono krei laborgrupon por komune pripensi la detalojn. Se la planoj ĝis oktobro 2013 estos kontentigaj, ekprepari la teknikan bazon (vikio/tradukaj iloj) kaj lanĉi ĝis la fino de 2013.

Esploro pri situacio de la interna informado

Ĝis novembro 2013 prepari kaj lanĉi enketon pri la interna informado. La enketo esploru kiel oni taksas la funkciadon kaj efikecon de la interna informado. Ĝi ankaŭ testu tion, kion scias pri siaj rolo, rajtoj kaj devoj la individuaj membroj, la komitatanoj kaj la aliaj aktivuloj de TEJO. Komence de la nova jaro, surbaze de la rezultoj, difini la problemojn kaj klopodi trovi solvojn.

Prezentaĵo pri TEJO

Disponigi regule aktualigitan prezentaĵon kaj kvizon pri TEJO kiun aktivuloj povas uzi en renkontiĝoj por prezenti la organizon kaj varbi. Aktualigita versio estu havebla antaŭ Arkones 2013.

Vikio de TEJO

Ĝis la fino de 2013 purigi kaj ordigi la vikion de TEJO. Ĉiuj informoj kiuj sufiĉe taŭgas estu enmetitaj en la retpaĝon de TEJO. La vikio mem estu modernigita. Ene de ĝi troviĝu ĉefe informoj ofte aktualigataj de diversaj homoj. Aparte estu prizorgita datumbazo de la landaj kaj lokaj organizoj, kiuj povu danke al tio facile trovi unu la alian kaj komuniki.

TEJO tutmonde

Ĝis oktobro 2013 efektivigi regulan voĉlegadon de TT ĉe Muzaiko, aldone al la jam laŭtlegata TEJO-aktuale. Samtempe difini enhavon kaj manieron uzi la blogon de TT.

10. Kulturo

Krom la daŭrigo pri la muzika kaj fota konkursoj preparitaj en la antaŭa oficperiodo, plej prioritatas vastigi alireblon al la Esperanto-kulturo kaj instigi la junularon al ĝia kreado kaj uzado. Tiucele servos preparota poŝtelefona programo kun aliro al *Kontakto* kaj aliaj kulturaĵoj kaj modaĵoj.

Muzika konkurso anstataŭanta la branĉon "Kanto" de la Belartaj Konkursoj de UEA

Okazigi la konkurson en 2014, lige kun la Belartaj Konkursoj de UEA tiujare.

Fotokonkurso en *Kontakto*

Varbi pri la fotokonkurso okazanta en *Kontakto* en 2013, kadre de ĝia 50-jariĝo.

Esperanto-programo por poŝtelefonoj

Krei Esperanto-programon por poŝtelefonoj unuavice kun kulturaj kaj movadaj informoj kaj aldone kun *Kontakto* (por IM) aŭ ties elektitaj eroj (por ne-IM). La porprogramo estu kreata tiel, ke ĝi povu esti riĉigata je pliaj eroj (ekzemple kurseto de Esperanto). La ideo- kaj tempoplano estu pretaj ĝis oktobro 2013. La unua provversio de la programo por Android ekfunkciu laŭeble ĝis la fino de 2013. Poste laŭeble estu pretigitaj ankaŭ versioj por aliaj poŝtelefonaj operaciumoj.

Kulturaĵoj rete haveblaj

Krei listaron pri la esperantaj rete disponeblaj kulturaĵoj, ekz. pri blogoj, alireblaj verkoj, subtekstigitaj filmoj, muzikaĵoj. La listaro estu preta ĝis oktobro 2013 kaj uzita por kreo de la poŝtelefona programo.

Artista datumbazo

Instigi al la kunlaborantoj reintensigon de laboro celante havi pretan datumbazon antaŭ la fino de 2013. Okaze de manko de espero pri tia realigo, ĝis la fino de 2013 pretigi alternativan planon por tamen funkciigi la retejon.

Libroklubo

Videbliigi kreiĝon de la Librokluboj kaj strebi al ilia populariĝo. Subteni legadon de libroj verkitaĵoj de junaj verkistoj kadre de la Librokluboj, ekzemple ebligante senpagan aliron al ili.

Ludoj

Ĉiumonate riĉigi vikian ludokolekton je almenaŭ du novaj ludopriskriboj. Depende de la planoj pri kompletigado de la kolekto, ĝis majo 2014 pretigi la PDF-forman libreton kun ludoj kaj priesplori indecon de papera eldono.

Kunlaboro kun Arkones

Ĝis la fino de 2013 pretigi planon pri la pli aktiva TEJO-flanke kunlaboro kun Arkones – aparte pri varbado, subteno al junaj artistoj, kiuj povus prezentiĝi tie kaj eventuale pri aliaj TEJO-programeroj.

11. Pasporta Servo

Pasporta Servo daŭre estas je tute nekontentiga nivelo. Necesas certigi, ke la papera kaj reta versioj estu dece prizorgitaj kaj samtempe pensi pri la eldono de poŝtelefona programo.

Papera eldono

Pretigi modelon kaj temposkemon por mastrumado de Pasporta Servo, tiel ke la publikigado de la papera eldono estu certigita minimume ĉiun duan jaron.

Reta versio

Certigi, ke la kodo estu en la formo kaj loko taŭga por plurpersona redaktado ĝis novembro 2013. Dispartigi la laboron al pli malgrandaj eroj, tiel ke ĝi estu farata ene de starigitaj limdatoj.

Poŝtelefona versio

Pretigi realigplanon de la poŝtelefona versio de Pasporta Servo ĝis aprilo 2014.

12. Edukado

TEJO-nivele ni jam ĉefe koncentriĝas pri subteno al formado de kompetentuloj, ĉar baza Esperanto-edukado kutime okazas lokanivele. Nun ni tamen celu kvazaŭ ankaŭ punkte salti al tiu loka nivelo por klopodi helpi al la aktivuloj organiziĝi, spertiĝi kaj enmovadiĝi tie, kie estas taŭgaj kondiĉoj, sed mankas homoj kapablaj instrui – en la landoj, kie estas grandaj ŝancoj je kreo de LS kaj en la urboj strategie prioritataj.

Intensaj kursoj en la landoj sen LS

Organizi unufoje jare intensan Esperanto-kurson en lando, kie mankas LS, sed kie ni povas kalkuli je loka subteno (ekzemple de novuloj aŭ de iu partnera organizo), kondiĉe ke post atenta analizo ĝi evidentiĝos finance eltenebla.

Intensaj trejnadoj en prioritataj urboj

Organizi unufoje jare intensan lingvan kaj enmovadigan trejnadon en unu el la UN-urboj aŭ eventuale aliaj urboj, kie urĝe kaj prioritare bezonatas aktivuloj, kondiĉe ke post atenta analizo ĝi evidentiĝos finance eltenebla.

Subvencioj por la KER-ekzamenoj kaj RITE (Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net)

Daŭrigi la subvenciadon kaj regulan reklamadon pri la subvencio por la TEJO-membroj por la KER-ekzamenoj kaj por RITE kaj eventuale ankaŭ aliaj instruistaj trejnadoj.

13. Scienca kaj faka agado

Starigi Komisionon pri Scienca kaj Faka Agado, kiu verku po du artikolojn por ĉiu eldono de la Scienca Revuo, havu konstantan rubrikon en Kontakto, kunlabore kun ISAE verku helpilon por verki artikolon, varbu por allogi pliajn Esperantajn sciencistojn, organizu sciancan prelegsesion dum junularaj aranĝoj, ellaboru kunlaboron kun KAEST, kolektu informojn pri aliaj Esperantistaj sciencafakaj organizaĵoj kaj kontaktu ilin pri ebla kunlaboro.